



## *La Germana Esperanto-Biblioteko Aalen*

– enkonduko koncizega – (2024-10-24)

Karaj gastoj!

Nome de Germana Esperanto-Biblioteko Aalen mi kore bonvenigas vin kaj dankas pro via intereso pri nia kolekto.

Mi donas plej koncizan enkondukon pri niaj historio kaj kreskanta kolekto. Se restos tamen demandoj aŭ malklaraĵoj, tio ŝuldiĝas al la koncizeco, sed bv. senĝene demandi! Eble, espereble, mi tiam povos pliprofundigi la magre donitajn informojn.

### **Nia pra-historio**

Jen nur kelkaj aludaj mencioj:

- rekono de ĉiama valoro de Esperanto
- tuj originalaj kaj tradukitaj verkoj, krome gazetaro
- 1a E-grupo en Nurenbergo: 1888
- Germana Esperanto-Asocio ekde 1906
- 1a Germana E-Kongreso en 1906
- Movada ekfloro Dresdena
- 4a UK en Dresdeno 1908
- naskiĝo de Reĝa Saksa Esperanto-Instituto (12.11.1908).

### **Naskiĝo de biblioteko**

Laŭ permesa konsento de la ministerio instaliĝis la statutoj de la instituto, kie legeblas: „La biblioteko de la instituto (kun ĉirkaŭ mil eroj) estas publika kaj uzebla el ĉiu loko de la



Germanuja Reĝlando. Eksterlandanoj devus aparte peti la uzadpermeson.“

Tiom da retrorigardo al la naskiĝa tempo de nia kolekto!

## **Etapo unua**

La unua etapo de nia prospera historio devige finiĝis en la jaro 1936, kiam la Nazioj ĉesigis „ĉiujn asociojn, kiuj traktas artefaritajn lingvojn“. Do ne nur la Germana Esperanto-Asocio devis morti, sed la sama sorto minacis trafi ankaŭ ties bibliotekon.

Ni memoru, ke la Nazioj jam en 1933 bruligis librojn, sen pripensi pri ties kulturaj valoroj. Kia teruriga imago!

Feliĉe oni sukcesis konvinki la Prusan Ŝtatan Bibliotekon en Berlino, ke ili transprenu donace la pli ol 3 mil erojn de nia kolekto.

Por la kolekto tio certe estis feliĉa okazo, sed por ni kiel posteuloj de tiu biblioteko ĝi estis (kaj ankoraŭ estas) grava perdo.

Per tio jam komencis vakua tempo kaj poste venis dua etapo.

## **Etapo dua kun rekomencoj**

Tiu feliĉe mallonga vaka periodo daŭris nur 12 jarojn, ĝis je la 9a Januaro de 1946 refondiĝis la Germana Esperanto-Instituto, sub gvido de d-ro Siegfried Ziegler. Kaj malavaraj donacoj de eksterlandaj Esperanto-organizaĵoj kaj de gravaj Germanaj Esperantistoj ebligis, restarigi imponan novan kolekton.



Sed tio ne tro longe daŭris. Jam en 1954 Ziegler retiriĝis, kaj la enhavo de la bretaro estis pakita en karton-skatoloj kaj iris al diversaj kelo-ĉambroj en Munkeno.

Sekvis do denova vaka tempo, kavazaŭ samlonga, ĝis la jaro 1967.

## **Releviĝo de la Germana Esperanto-Biblioteko**

En la jaro 1967 la Germana Esperanto-Asocio trovis novan motoron en persono de pastro Adolf Burkhardt, kiu kun helpo de Reinhard Haupenthal ebligis la revivigon kaj reordigon de la biblioteko.

Sidejo kaj bretaro ĉiam kunmigris al diversaj paroĥaj domoj de Burkhardt, sed post emeritiĝo de pastro Burkhardt, la libroj kaj gazetoj ne plu havis lokon por iliaj bretaroj.

## **Translokigo al urbo Aalen**

Kiel jam menciite, la historio de la Germana Esperanto-Biblioteko montriĝas kiel sinsekvo de feliĉaj okazoj; jen denova:

En la sudgermana urbeto Aalen ni havis sufiĉe viglan Esperanto-grupon kun intereso pri libroj kaj bonaj kontaktoj al pastro Adolf Burkhardt.

Koincide al tio: samatempe naskiĝis la renoma *FAME-Fondaĵo por stimulado de internaciaj komunikiloj*, kies fondinto kaj motoro Franz Alois Meiners jam amikiĝis kun la Esperantistoj en Aalen.



FAME instalis sian FAME-Esperanto-kulturpremion kaj baldaŭ, por firmigi la sidejon de la biblioteko, ĝi ankaŭ lokigis sian sidejon al Aalen kaj nomis sian premion Esperanto-kulturpremio de Aalen kaj la FAME-Fondaĵo.

En Oktobro 2024 ĝi disdonis jam la 18an distingon, al la muzikistino Kjara (Chiara Raggi).

Kiam mortis Adolf en Aprilo 2004, Utho Maier estis nomumita kiel nova direktoro de la biblioteko.

## **La nuna kolekto de la biblioteko**

Unue la kolekto estis prilaborita kaj restarigita post 1967 laŭ konsiloj de s-ro Reinhard Haupenthal, kiu siatempe estis instruad-komisiito por la lingvo Esperanto en la universitato de Saarbrücken. Li forte rekomendis, uzi la starigon de la eroj laŭ klasifado, kiun Montagu Christie Butler modifis por adaptigaj bezonoj de Esperanto-kolektoj. Tio *ne tute* estis la klasika Universala Dekuma Klasifo (*UDK*), sed ĝuste la *sistemo laŭ Butler*. – Ĝis hodiaŭ, la eroj staras laŭ tiu ĉi vico en la bretaro, almenaŭ la antikva parto.

Sed en la praktiko, tiu sistemo postulas, ke pro la daŭraj novakiroj, kiu ja necesas, por ke la kolekto estu ĉiam aktuala, ni ĉiam ŝovu la erojn, por trovi lokojn de la novaj eroj.

Iam tio montriĝis ne plu eltenebla kaj ni do ĉesis tian aplikadon. Ek de la jaro 2004 ni do transiris al bretar-starigo laŭ la „numero kuranta“ – metodo, kiun jam longe uzas tre multaj modernaj kaj grandaj kolektoj.

Ek de la jaro 1968 komencis surpapera slipara katalogo. Tre baldaŭ oni konvinkiĝis pri la neceso de perkomputora katalogo. Tion preparis grupo de Munkenaj studentoj sub gvido de d-ro Martin Weichert, kiu surbaze de la tiama DBase-„slipoj“ presigis la unuan paperan katalogon.

Kun subteno de faka universitato pri bibliotekado en Stuttgart, nome profesoro Klaus Sailer, ni aĉetis la sistemon LARS, al kiu tre rapide eniris la elektronikaj slipoj el DBase.

Dum kelka tempo ni laboris paralele (kaj skribante sur paperajn slipojn kaj entajpante ilin en la sistemon LARS. Sed post iom da tempo la elektronika sliparo de LARS estis kompleta, kaj ni povis forlasi la paperan katalogadon.

## **Iom da statistiko kaj informoj pri nombroj**

Unu jaron post la kreiĝo de Esperanto ekzistis jam 29 libroj. Tiu nombro kreskis al 75 en 1895, kaj en la jaro 1912 la mondo havis jam 1989 Esperanto-librojn.

La kolekto „Biblioteko de la Reĝa Saksa Esperanto-Instituto“ startis en la jaro 1908 kun ĉirkaŭ 1000 eroj.

Ĝi kreskis al ĉirkaŭ 3 mil eroj, kiun oni „savis“ en 1936 per donaca transdono al la Prusa Ŝtata Biblioteko en Berlino.

Kiom da eroj posedis la postmilita refondita Biblioteko de la Germana Esperanto-Instituto, ne estas tute klare; ĉiukaze: en 1954 estis stokitaj „multaj kartonaj skatoloj“ en Munkenajn kelojn – verŝajne temis pri ĉirkaŭ 2 mil eroj.



Sed kiam en la jaro 1989 okazis la translokigo al Aalen, necesis jam granda kamiono por transporti la intertempe pli ol 10 mil erojn.

En la jaro de ĝia centjara jubileo, 2008, la biblioteko jam posedis pli ol 41 mil erojn.

Fine ni mallonge prilumu la nunan staton de jarraporto 2023.

Tie oni legas pri pli ol 57 mil eroj; pli detale:

- ⇒ la katalogparto de monografioj AALIB jam havas preskaŭ 44 mil erojn,
- ⇒ la gazetara kolekto AAGAZ priskribas pli ol 2700 diversajn periodaĵojn; preskaŭ 10 mil jarkolektoj estas kompletaj.

Sufiĉu tiuj informoj kaj detaloj, espereble, ĉar forflugas la tempo.

Mi kore dankas vian intereson kaj paciencon atenton!

*Utho Maier, direktoro de la Germana Esperanto-Biblioteko Aalen*

*stato de lastaj ŝanĝoj: 2024-10-24*